

Gvidilo al niaj gvidiloj



La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj funkcias laŭ tri-nivela sistemo:

Statuto: Difinita de la Komitato. Oficiale registrita ĉe nederlandaj instancoj.

Regularoj: Ĝenerala regularo kompletigas la Statuton; ekzistas pliaj regularoj.

Gvidiloj: Ili donas detalan precizan gvidon pri postenoj kaj laborkampoj.

Gvidiloj estas enkondukitaj ekde septembro 2009, kaj ricevis formalan statuson en la Statuta revizio en Kopenhago en julio 2011. La estraro aprobas gvidilojn; por validi, ili devas esti publike afiŝitaj kaj la Komitato rajtas postuli modifojn.

Jen la stato de la gvidiloj je la komenco de januaro 2012, listigitaj en la dezirata ordo por hejmpaĝa aperigo:

R = videbla en la retejo www.ilei.info sub Dokumentoj > Gvidiloj

V = verkita aŭ parte verkita, bezonanta kompletigon aŭ aktualigon.

D = ne ekzistas, sed estas dezirinda.

Gvidilo al niaj gvidiloj	V (vi legas ĝin)
Gvidilo por sekciestroj	D (povos inkluzivi anoncadon de membroj)
Gvidilo por reprezentantoj	R
Gvidilo por komitatanoj	D (enhavus gvidon pri reta voĉdonado)
Gvidilo por labor-komisionoj	D
Gvidilo laŭmonata	V
Gvidilo por la Sekretario	V
Gvidilo por la Kasisto	R (gvidilo havas nun alian nomon)
Gvidilo por la Membro-Administrado	V
Gvidilo por la Prezidanto	V
Gvidilo por la Vic-prezidanto	D
Gvidilo por estraranoj	D
Gvidilo por Konferenca Organizado	V (devas ekzisti; ankaŭ la regularo utilas)
Gvidilo pri la Koleghelpa Kaso	R
Gvidilo por la budo-prizorganto	R (gvidilo havas nun alian nomon)
Gvidilo pri renkontiĝoj	R
Gvidilo pri eksteraj rilatoj	D
Gvidilo por peto de sekcia aliĝo	R (troviĝas fine de la pet-formularo sub Sekcioj)
Gvidilo por fariĝi reprezentanto	R (troviĝas fine de la pet-formularo sub Sekcioj)
Gvidilo por eldonaĵoj de la Ligo	D
Gvidilo por Simpoziaj Kajeroj	R
Gvidilo por la Scienca Komitato de IPR	D (universitata komisiono taskita verki ĝin)
Gvidilo por redaktoroj de Juna amiko	D
Gvidilo por kontribuantoj al Juna amiko	RV (ekzistas sub Revuoj > Juna amiko sed bezonas iometan ĝisdatigon. Post tio estu alirebla ankaŭ de 'Gvidiloj'. Celata ankaŭ por rubrikestroj.

Al ĉi tiu gvidilo povos aldoniĝi gvido pri la delikata arto verki bonajn gvidilojn. ☺